

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE
ESPERANTOFÖRENING

Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.)

N:o 8.
Augusti 1914.

Redaktör:
R. PEHRSSON
Kraftverket, Älvkarleö.

Ansvarig utgivare:
W. WAHLUND
Gävle.

Lösnummer 10 öre.
Årsprenumeration 1:20 kr.
Annonspris 5 öre pr mm.

Milito.

Kiel fulmo de sennuba ĉielo, disvastiganta tutan terparton ampleksantan bruladon, venis la milito, ĉien jetante siajn nigrajn ombrojn. Ŝajnas esti sanga ironio, tiu milito, kontraŭ ĉiuj la kulturaj progresemaj movadoj de la nuntempo, ĉefe do la mond-paco! Tiu idealo, pri kiu jam antaŭ jarcentoj la pioniroj de la kulturo kuraĝis reŝi, sed kiu nur antaŭ kelkaj jardekoj komencis eniri en la popolkonscio. Sed nur malrapide la evoluo de la homara opinio okazas, anstataŭ en jaroj oni devas kalkuli la tempon en generacioj. Kaj pri tiu ankaŭ ĉiu vera progresemulo bone scias, ne estas la espero pri baldaŭa propra profito, kiu instigas lin labori; ne, estas la konvinko, ke la justeco de la afero iam igos ĝin realaĵo.

Por ni esperantistoj la milito certe estas grava bato, kies efikojn ni longe sentis. Jam ni havis la unuan dolorigan sperton: la deka universala kongreso, por kiu niaj francaj samideanoj en jaroj fervorege kaj entuziasme laboris, pri kiu ĉiu samideano longe ĝojis kaj fieris, al kiu la miloj da esperplenaj partoprenantoj jam komencis alvojaĝi, ĝi neniam povis komenci, kaj la diversaj samideanoj estis perforte reĵetataj al siaj hejmlandoj. Kaj — malĝojiga penso! — sur la diverslokaĵ batalejoj eble batalas nun multaj samideanoj unu kontraŭ la alia, puŝataj de la fantomo de la milito, neevitebla tiel longe, kiel la homoj ne lernis estri sin mem, sed ne pli longe.

Tamen oni kun certeco povas antaŭvidi, ke la milito, kiu nun sin montras en sia tuta terura realeco, skuos la dormantan konsciencon de la mondo kaj devigi la homaron pensi iomete, tiamaniere preparante ĝin por la novaj ideoj. Nun sin montras ankaŭ la interna valoro kaj forto de *nia* ideo; por ni estas la ĉefa afero ĉiam ankoraŭ resti *esperantoj*; ne revantaj, senagaj, sed praktikaj, laborantaj esperantoj:

»Ni ĉiam memoru pri bon' de
l'homaro
kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto
kaj staro
al frata la celo ni iru obstine
antaŭen senfine!«



Livsgåtor.

Pärlestänk och fläktar från Österlandet.

II.

Världens olika språk ha en historia, som är synnerligen intressant. Språkforskningen har bringat ljus över många dunkla saker och i hög grad verkat befruktande på andra vetenskapsgränar. Resultatet, till vilket man inom språkvetenskapen redan hunnit, är av en alldeles oerhörd betydelse. Nu veta vi, att de flesta av våra ord äro gemensamma med dem i sanskrit och i övriga delar av den ariska språkstammen. Vidare veta vi, att grammatiken för alla ariska språk är densamma och fullständigt skiljer sig från semitiska och övriga språkgruppers gram-

matik. Man får rent av en känsla av svindel, när man ser hur nära i verkligheten den avlägsna forntiden står till vår tid, hur nära inpå oss vi här i Västerlandet ha Österlandet. Det sagolika Österlandet med sin prakt och sina aldrig sinande andliga flöden, har ryckt oss in på livet. Österlandet är den mänskliga odlingens vagg, dess ljus sprider sina strålar över hela världen. Pärlestänk och fläktar från Österlandet komma ej blott till senare tiders barn. Hur man än följer det mänskliga livets yttringar genom oerhörda tidsåldrar, så strålar genom sekler, ja redan i seklernas morgongryning *Österlandet* med bländande sken. Det är ett rikt land. Vilka skatter ha ej därifrån kommit till oss! Hur mycket vetande har ej därifrån sipprat ut över jorden, befruktande och pånyttfödande! Vilken rikhaltig litteratur och konst kan man ej där spåra! Österlandet är för oss här i Europa vårt längtans mål. I Österlandets solglans vilja vi värma oss, tjusas av dess magiska skatter och känna en fläkt av Österlandets rika andliga liv. Varför denna längtan, denna trängtan till Orienten, och särskilt till Indiens solljusa nejder, om vi ej skulle känna oss befreundade med dess folkslag? Det är ett band, som förenar oss, kanske icke alldeles fullt klart för många, men som vi likväl periodiskt kunna spåra och vars tillvaro vi instinktlikt mången gång känna. Det blev vår tid förunnat att påvisa sambandet mellan den österländska och västerländska kulturen och till fullo visa, hur nära forntiden står nutiden, hur nära man i verkligheten fört Österlandet till Västerlandet. Hur frestande det än månne vara, skall jag dock icke

här ingå på dessa märkliga kulturhistoriska kedjor, utan blott något dröja vid det *språkliga* organiska sambandet. Professor Max Müller har i sina ypperliga språkvetenskapliga arbeten och i sina över hela världen uppmärksammade afhandlingar och uppsatser om Orienten, dess språk och litteratur mer än någon annan i senare tid levande forskare behandlat språkens liv och utveckling.*) Det är ju också ganska märkligt, att *Esperanto* fick det amplaste erkännande och stöd av denne andens storman och kritiske forskare. Intressant är att läsa hans avhandling »*Die Geschichte der verschiedenen Sprachen der Welt*». Jag vill därför på basis av prof. Max Müllers undersökningar och uppsatser samt med ledning av andra källor ge några exempel på sambandet mellan till synes vitt skilda språk och tungomål. Låt oss sålunda dröja vid några intressanta fenomen inom de nu levande, moderna språken.

Var och en vet, att i alla den ariska rasens språk räkneorden äro desamma. Men hur många ha fullt klart fattat innebörden av detta märkliga faktum? Må vi blott betänka, vad det betyder! *Decimalsystemet* måste följaktligen ha utbildats och antagits av våra rasförfäder. Varje siffra från ett till hundra måste ha fått sitt namn, och alla dessa namn måste ha blivit fastslagna icke genom en överenskomst, utan genom bruket. Räkneordens ålder se vi bäst därå, att de icke kunna härledas från några av oss kända språkrotter. Vi kunna därför icke angiva, varför sex en gång kallats sex och sju för sju. Dock finna vi i sanskrit, i armeniskan, grekiskan, latinet, slaviskan, tyskan o. s. v. precis samma serie av räkneord. Men frändskapen hos andra språkdelar är ännu större, och den moderna tyskans beroende av sanskrit, som ofta kallas världens äldsta språk, är stundom rent av förbluffande. Varför skriva vi nu till exempel i tyskan Tod, men tot? Eller med andra ord, varför har participium ändelsen t, substantivet ändelsen d? För att förstå anledningen till d i Tod och t i tot, må-

*) Anm. En uppsats av prof. Max Müller angående den Orientaliska litteraturens ålder och indoeuropeiska språk finnes publicerad även på svenska i »Nordisk Revy» (1896). Artikelförf.

ste vi ingå på detaljer i den komparativa grammatiken. Vi känna nog var och en till Grimms lag. Enligt denna lag finna vi överallt, där vi i sanskrit, i grekiskan, keltiskan och slaviskan ha ett t, i gotiskan, angelsachsiskan och engelskan ett aspirerat t eller th, i tyskan alltid ett d. Denna regel tillåter intet undantag, åtminstone intet för vilket vi skulle kunna ange särskilda skäl. Är icke detta förhållande underbart? Språken stå ju i ett fullständigt beroende av varandra. Om sålunda »tre» är i sanskrit *trayas*, i latin *tres*, så måste det i engelskan vara *three* och i tyskan *drei*. Underbart! Där se vi nu att ett samband mellan språken, en inre logisk kedja i språkbyggnaden, ett organiskt samband mellan orden i de olika språken. Men låtom oss gå vidare! Om »du» är i sanskrit *tuan*, i latinet *tu*, måste det i engelskan vara *thou*, i tyskan *Du*. Det är verkligen ett intressant fenomen detta genomgående språkliga beroende. Enligt samma grunder ha vi det latinska *tonitrus*, det engelska *thunder* och det tyska *Donner*. På samma sätt även det latinska *tennis*, engelska *thin* och det tyska *Dünn*. Vi kunna ta ett annat ord till exempel det latinska *tectum* och vi finna det motsvarande engelska *thatch* och det tyska *Dach*. Vi kunna på likartat sätt visa, att ett indoeuropeiskt ord fått sin struktur enligt absoluta, orubbliga lagar. Så övergår exempelvis i mittljudet ett indo-germanskt t till germanskt th och tyskt d. Jämför latinets *frater*, engelskans *brother* och tyskans *Bruder!* Samma likhet i grekiskans *Hotepos*, engelskans *whether* och tyskans *Weder*. På samma sätt är det även i slutet av ordet. Av latinets dens *dentis* blir i gotiskan *tunthus*, i engelskan *tooth*, i fornhögtyskan *Zand*. Som vi se, äro våra moderna levande språk direkta avkomlingar av tungomål, som på ett tidigare skede varit använda av olika folk och stammar. Esperanto bygger på dessa språk och har sålunda en lång, skiftande historia bakom sig. Esperantos framgångar äro ju betydelsefulla, och Esperanto är nu utbrett över alla jordens länder. Tyst och stilla, utan all reklam har språket gått framåt, besegrande *alla* hinder. Esperanto har blivit universitetens och skolornas språk, det har inträngt i vetenskapens och teknikens olika grenar, blivit språket för affärsmannen, turisterna, för alla och en var. Men des-

sa väldiga Esperanto-framgångar ha också fött till liv en massa plagiatörer och »förbättrare». På senare tiden ha en del klåpare slagit sina björnhänder i Esperanto och »förbättrat» de däri klangsköna orden *sinjoro* till »sioro», *hirudo* till »sanguisugo»!! o. s. v. Men ej nog därmed. Man har även haft panna att utbjuda denna avart av Esperanto såsom fullgod vara. Även här i Sverige har man sett tendenser i den vägen, och »förbättrarna», reformisterna ha i det här landet till och med överbjudit varandra. Måttet är dock nu rågat, och jag kan med fog i likhet med Ahasverus till »förbättrar»-Prometeus utropa:

»Nu är jag trött att längre lyssna
till
ditt tal om vad I sjungen, vad I
anen.
Ert stridsrop är som fläderpipans
drill
mot brakets av den åskande orka-
nen.
Om era »förbättrare» sjönge dagen
lång,
går världen dock förkrossande sin
gång,
och er tanke lyfter intet lod,
än mindre världssystemet ur dess
hakar.
Fördenskull gör du bäst, om du för-
sakar,
att visa dårens trots och övermod!»

Just det! Ett språk som *Esperanto*, som i själva verket har tusenåriga anor, skall man icke komma till med orena händer. Det är en klenod, därtill alltför kostbar. Den roll, som Esperanto kommer att spela, torde ej nu alldeles kunna uppskattas. Esperanto för med sig sådana oerhörda konsekvenser, att helt säkert få Esperantister tillfullo fattat hela vidden av Esperantos stora betydelse. Esperanto och den imponerande världsrörelsen i esperantos tecken, som vi nu bevittna, innebär en ny era i mänsklighetens historia. Esperanto, såsom språk betraktat, är också underbart. Här ha vi ju faktiskt alla världens språk enade. Hela världens skiftande tankar och idéer kunna i Esperanto taga form och i ett slag nå *alla* jordens folk och raser. För den klassiskt bildade människan framstår Esperanto i en alldeles sär egen belysning. De beundransvärda klassiska språken ha i Esperanto återuppstått i förnygrad och förskönad gestalt. Antikens hela poesimättade stämning slår en till

mötes i Esperantos klangrika och kärnfriska ord. Hör blott till exempel följande strof på världsspråket Esperanto:

»En la mondon venis nova sento
tra la mondo iras forta voko.»

Vilken klang och ljudrikedom, vilken smekande rytm i Esperanto! Men låtom oss i en följande artikel återgå till de indo-europeiska språkens liv och utveckling.

Teodor Rosengren.



Ord eller tankar?

Jag befann mig jämte en annan esperantist på resa ned till Esperantomötet i Malmö. Bland den lektyr som vi tagit med oss för att fördri va de långa timmarna under resan, var händelsevis en veckotidning, vari vi vid närrare granskning funno något som väckte vårt intresse. Det var nämligen ett inlägg i en liten diskussion eller polemik, vad man nu vill kalla det, i världsspråksfrågan. Tyvärr funno vi, att det var allt annat än glädjande uppgifter för oss esperantister. Författaren konstaterade nämligen helt lugnt, att Esperanto i praktiken var absolut »omöjligt» att använda!

Snart voro vi emellertid vid målet för vår resa och vi hade ej längre tid att tänka på mer eller mindre roliga tidningsuppsatser; de få dagar som stodo oss till buds, gled snabbt, i den angenäma samvaron med en mängd »samideanoj» alltför snabbt, undan.

Först då jag åter satt på tåget, som skulle föra mig hem, erinrade jag mig den lilla artikeln i veckotidningen. Jag kunde ej undgå att göra några reflektioner för mig själv. Jag erinrade mig särskilt en dag, jag tillsammans med några danska esperantister tillbringade på Baltiska utställningen i Malmö, från bitida på morgonen, då jag mötte dem vid båten, tills sent på kvällen, då vi deltog i den supé, som med anledning av de Baltiska Esperantodagarna ägde rum å »Kaslet», och huru vi hela dagen voro hänvisade till Esperanto. Och det var inte några fattiga torra fraser, som utväxlades, samtalen rörde sig, fritt och obesvärat, som om det vore på vårt

modersmål, om allt möjligt mellan himmel och jord; den kollosala utställningen gav oss nog stoff att prata om. Samma dag hade jag tillfälle att sammanträffa med två ryska esperantister från det avlägsna Moskva och utbyta några ord med dem. (I förbigående kan jag omnämna, att de voro bland de mest sympatiska personer jag råkat, vilket torde förvåna åtskilliga som ha en något underlig uppfattning om ryssarna). Icke utan förvåning konstaterade jag, att dessa esperantister från det avlägsnaste Ryssland, som till modersmål ha ett språk som så mycket som möjligt skiljer sig från svenskan, hade ett uttal som knappast på något sätt skilde sig från vårt, annat än därigenom, att deras uttal var mer vårdat och tydligt. — Men låt oss återvända till tidningsuppsatsen, som gav upphovet till dessa erinringar. Då jag sammanställde dessa nyvunna erfarenheter och mångfaldiga liknande, som dessa väckte till liv, uppstod oemotståndligt den frågan: hur kan en person, som själv kallar sig en förkämpe för det internationella hjälpspråket utan minsta tvekan framkasta ett sådant påstående. Är det av illvilja? Nej, det får man väl knappast tro. Utan det är väl fastmer så, att det är ett oreflekterat återgivande av tankar och åsikter, som genom ett slags suggestion, som genom att gång på gång hava upprepats i ord och skrift, bibringats en person, som härigenom, då han tror sig tänka egna tankar, i stället säger saker, som längesedan förlorat all kontakt med verkligheten och upphört att vara tankar.

Endast på detta sätt kan ett dylikt påstående förklaras. Och detta fall är endast ett av de många; de förekomma både hos vänner och motståndare och envar må akta sig för att ge sig till offer för denna makt. Ty det är en makt denna suggestion, en makt som kan och har missbrukats, icke minst inom världsspråksrörelsen, där personer så utövat denna avart av propaganda, att de till slut förlorat allt begrepp om den sak de säga sig förfäktat.

Rpm.



Samideanoj!
Abonu "La Espero"!

Fyrväpplingens pristävlan.

Till förste pristagare i den av tidningen Fyrväpplingen anordnade Esperantopristävlan har prisnämnde utsett herr Peter Berg i Kungslena, Skaraborgs län. Vi nöja oss med att härmed uttala våra lyckönskningar till den lycklige vinnaren, men skola vi i nästa nummer återkomma till saken.



Berta von Suttner †.

Åter har Esperantorörelsen förlorat en varm vän — Berta von Suttner, som den 21 juni avled i Wien.

Baronessan Berta von Suttner föddes i Prag år 1843, och hörde genom börd, uppfostran och äktenskap till de högsta kretsarna av Österrikes adel, vilket hon för övrigt väl skildrat i sina verk, t. ex. »High-life».

Den bok, varmed hon i ett slag gjorde sig ett namn, var emellertid den år 1889 utgivna romanen »Ned med vapnen». Sedan dess har boken översatts till en mängd andra språk och just i år har den i enlighet med författarinnans egen önskan utkommit i esperantisk översättning. Det var även i första rummet denna bok, som förskaffade henne det nobelska fredspriset år 1903.

Det är svårt att uppskatta betydelsen av denna underbara bok för fredssaken. I djupet av varje människas medvetande finnes väl övertygelsen om att kriget är något absolut naturstridigt, en skamfläck för den mänskliga odlingen. Men denna övertygelse har det varit ett brott att bekänna, det måste i stället på allt sätt bekämpas. Det är Berta von Suttners evärdeliga förtjänst, att hon haft det moraliska modet att bryta mot århundradens tradition i detta hänseende och ropa fritt ut sin övertygelse. Hon är icke den första, som gjort det, men hon har gjort det på ett sätt, som ryckt tusende med sig, som med henne sammanslutit för att i medvetandet om rättvisan i sin sak bringa den till seger. Just nu är Europa skådeplatsen för ett krig, som i blodighet kommer att överträffa alla föregå-

ende. Fredsvännerna ha icke förmått avvärja detta, kanske icke heller nästa, men en gång skall det lyckas dem, detta är den övertygelse som börjar ingå i världens medvetande.

Det är ur samma övertygelse som Esperanto sprungit fram. Det är därför helt naturligt, att »Ned med vapnets», författarinna, med den djupa bildning, hon förskaffat sig, fullkomligt sympatiserade med esperantismen.

Rpm.



Semu!

Ho, semu matene la semon en teron,
Nek lasu vi haltu la manon vesperon;
Al dubo, al timo atentu neniam,
Sed semu vi vaste, kaj ĉie kaj ĉiam.

Nek teron la bonan, nek frukto-
donantan.

Atendu, sed havu esperonkonstantan;
Vi trovos terpartojn ĉi-tie kaj tie;
Do, iru sur monto, tra valo kaj ĉie.

Ne scias vi, kiu semeto prosperos,
Sed ja ĝustatempe la frukto aperos;
Folio, spiketo kaj poste plengreno,
Kaj fine — la ĝoja rikolta — ma-
teno.

De *James Montgomery*.

(Traduko el la angla lingvo)

The British Esp.



S. E. F.

Kiel estas sciigata en la detala raporto pri la »Baltaj Esperantistaj tagoj» presita aliloke, la malnova estraro de la federacio estis reelektata. Ĝi do konsistas el la sekvan-taj personoj:

- S-ro J. Lundgren, Hedemora, pres.
- » W. Wahlund, Gävle, vica prez.
- » J. Helsing, Gävle, kasisto.
- » R. Pehrsson, Älvkarleö, sekret.
- » G. H. Backman, Helsingborg.
- » T. Rosengren, Stockholm.
- » Otto Roesel, Borås.
- » Albin Zachrisson, Karlstad.
- » Carl Ohlsson, Göteborg.
- » Paul Nylén, Stockholm.

F-ino Helmi Josefsson, »

S-ro A. K. Örn, Gävle.

Esperantistoj:



A. K. Örn.

S-ro Örn estas unu el la plej laboremaj samideanoj en Gefle. De la komenco de la esperantista movado en Gefle li ĉiam varbis novajn adeptojn al nia movado kaj ĉiamaniere agitis por la lingvo. Kiel oni povas vidi de la uniformo, li estas policisto. kaj tial li sukcesis multe interesigi la policistaron por Esperanto. Li intencis viziti la »Dekan» en Parizo kaj samtempe ĉeesti la kongreson de la policistoj tie, sed de la bedaŭrinda milita stato li ne povis veni pli longe ol al Berlino, de kie li estis devigata returni hejmen.

S-ro Örn estas bibliotekisto en la Esperanta klubo de Gefle, krome li estas vic. delegito de U. E. A. kaj apartenas al »Intern. Polica Asocio».

Kie ajn li estas, li propagandas nian lingvon. Tiajn ni devas havi multajn.

E. A.



PÅ GRUND AV krigets verkningar, speciellt mobiliseringen, har detta nummer av La Esperon fördröjts, men skola vi försöka övervinna svårigheterna och även i fortsättningen utge tidningen. Förbindelserna med utlandet äro dock naturligtvis så gott som avbrutna, varför meddelandena om rörelsen även i de länder som äro oberörda av kriget måste bli få eller inga, vilket vi bedja våra läsare ha överseende med.

Red.

La Baltaj Esperantotagoj en Malmö

Dimanĉon la 26-an de julio flirtis la unuan fojon esperantostandardo en Malmö, la tria urbo de Svedujo, ekster la domo de la industria societo Notinde estas, ke la bela standardo estas donacita al la klubo de D-ro Lindberg.

Je la sesa vespere kolektiĝis en la salono de la industria societo la partoprenantoj en la kvara tutsveda esperantotago. La sekretario en la klubo esperantista de Malmö, fil. kandidato J. Pettersson salutis, en la nomo de la komitato, ĉiujn bonvenintaj. Inter la ĉeestantoj mi povas noti rusan samideaninon kaj samideanon, S-ro Stanislav Szabuniewicz, del. de U. E. A. en Moskvo, kiu preparolis la movadon en sia urbo kaj transdonis al la svedaj esperantistoj salutojn de la ruslandaj samideanoj.

Poste ĉiuj tramveturis al la »Balta Ekspozicio», kie en la restoracio »Kastellet» bona supeo estis aranĝita. Dum la supeo okazis vigla konversacio kaj oni sendis kartojn al multaj neĉeestantaj esperantistoj. Al D-ro Zamenhof oni sendis telegramon. La tri danaj esperantistoj ĉeestantaj, S-ro Blicher kun edzino kaj fraŭlino Borgman, la saman vesperon devis veturi Kopenhagon kaj tial S-ro Blicher en parolado dankis por la agrabla kunesto kaj salutis min bonvenontaj al la internacia esperantokongreso en Kopenhago en la jaro 1916.

Kiam la supeo estis finita, oni provis la amuzojn de la Balta Ekspozicio.

La lundo kaj la mardo estis okupataj de vizitado de la Ekspozicio. La mardo ni ankaŭ havis viziton de kelkaj norvegaj esperantistoj kaj la redaktoro por la gazeto »Norges Blinde». Ili ĉiuj intencis viziti la »Dekan» kaj deziris dum la traveturado pasigi tagon kune kun la svedaj samideanoj. Tiun tagon ni ankaŭ, kun la afabla gvidado de spertisto en la arta fako, S-ro J. Pettersson, trastudis la artohalon de la Balta.

La merkredon je la deka oni ree kolektiĝis al laborkunsido. Kiel prezidanton por la kongreso oni elektis S-ro G. H. Backman el Helsingborg kaj kiel sekretario S-ro W. Wahlund el Gefle. La antaŭjara estraro estis reelektita. La

kunsido decidis sendi S-ro Carl Vinberg el Bengtsfors kiel reprezentanton al la Deko Universala Kongreso de Esperanto en Parizo. Krome oni difinis, ke S. E. F. aniĝu al U. E. A.

Kiel membrojn en la redakcia komitato oni elektis s-roj Adamson kaj Pehrsson el Gefle kaj Petterson el Malmö.

Inter aliaj decidoj oni laŭ propono de E. Adamson difinis, ke la kongreso elparolu kiel sian deziron, ke ĉiu esperantisto ensendu al la komitato por disdonado de la pacopremio de Nobel karton, en kiu ili devas esprimi kiel sian deziron, ke d-ro Zamenhof ricevu la venontan pacopremion. En komitato por disvastiĝi kaj ebligi tion oni elektis s-ro G. H. Backman kaj la proponinto. La venontan tutsvedan esp.-tagon oni decidis aranĝi en Borås.


Post tio oni legis la alvenintajn telegramojn kaj salutleterojn al la kongreso. Ni ricevis salutojn el sekvantaj gesamideanoj kiujn ni tiamaniere volas danki por la afableco. N. Starosjelskij, Rusujo, Karl Olsson, Göteborg, Hildegard Nickel, Potsdam, Germanujo, Blomqvist, Sveden kaj Larson, Borås, kaj Otto Roesel, veturante Parizon.

Kiam la kunsido estis finita nia finnlanda samideano, pastro Pätiälä, dankis por la afabla akcepto kaj esprimis kiel sian deziron, ke la sveda esperantomovado estu forta. Post kiam ni ĉiuj kune trinkis kafon, ni vizitis la esperantan ekspozicion.

La vesperon oni pasigis en la kampo de la Balta Ekspozicio kaj la tago poste oni renkontiĝis en Kopenhago por tie adiaŭi la ankoraŭ restantajn Parizon-veturantajn samideanojn. Tie ni kune kun la danaj esperantistoj pasigis kelkajn tre agrablajn tagojn kaj volas nun esprimi al la Kopenhagaj esperantistoj speciale s-ro kaj s-ino Blicker, D-ro Leünbach kaj la fraŭlinoj Agnes Melchior kaj Helene Borgman kaj aliaj, nian sinceran dankon por la afableco montrita kaj la helpo donita dum nia restado en Kopenhago.

Fine ni volas danki la samideanojn en Malmö por la bone aranĝitaj esperanto tagoj tie. Unue do la du fervorajn samideanojn kaj la ĉefajn aranĝantojn de la kongreso, sinjoroj John Petterson kaj Carl Rosengren. Ĝis revido!

E. Adamson.



Raporto — pri la ne-okazinta kongreso en Parizo.

Per tio ĉi mi havas la devon kun bedaŭro sciigi, ke, pro la milita stato, mia honora komisiono riprezentian landon ĉe la Deko Universala Kongreso de Esperanto en Parizo tute malsukcesis.

Ĉar mia filino sekvis min kaj mi ne volis elmeti ŝin al malagrablajoj pri kiuj ni jam aŭdis, mi atingis nur Danujon, kie tamen plej afablajn samideanojn ni trovis kaj el kie mi sciigis al la Kongreso pri mia nealesto. Pri la Kongreso mi do renion povas raportiti, nek doni sciigon pri io ajn al la Kongreso.

Anstataŭ al la Kongreso mi do raportas tie ĉi, ke la Samideanoj en Malmö kaj ĉirkaŭaĵo bone propagandis havante grandan ekspozicion ĉe unu el la ĉefstratoj. Nia standardo vigle flirtis de la domo de la sveda kongresa kunveno. Tiel same ĉe la balta ekspozicio nia flago estis alte portata kaj la seĝo pri Esperanto estis granda. Ankaŭ en Kopenhago, speciale en Tivoli oni miris kaj demandis

Nur en Malmö unu simplanimulo atakis la flagportanton, opiniante, ke Esperanto estas la lingvo de ŝtelistoj kaj mortigistoj. »Vi estas prava» estis la respondo »ŝtelisto ĉiam disvolvas standardon kaj krias: gardu vian monujon!».

En Kopenhago ni kunestis kun la tri redaktoroj de la blindulaj gazetoj de la skandinavaj landoj, kiuj tiel same kiel ni estis malhelpataj. Koran dankon ni diras al samideanoj en Malmö kaj Kopenhago, kiuj lastaj interalie aranĝis al ni belan koncerton, ĉe kiu ĉefe kunhelpis Fraŭlinoj Melchior kaj Höjer kaj kiu unuenomata kantis en Esperanto amason da ĉefverkoj kaj diverslandaj kantoj, reverkitaj en Esperanto de nia dana poeto, D-ro Leünbach, kiu akompanis fortepiane. Fine la danoj preparis al la svedoj gajan amuzojn per svedaj gajakantoj.

Alveninte dimanĉe, la duan de Aŭgusto, al la ŝipo, kiu rekondukos nin al Malmö, ni renkontis svedajn kaj finnajn amikojn, kiuj intencis partopreni la germanan karavanon, sed devis, ho ve! iri returnen el Berlino.

Preskaŭ kun larmoj ili rakontis, ke oni ludis nian himnon kaj la

Esperantistoj kantis: »Ne al glavo sangon soifanta — — —», dum ekstere la militistoj preparis siajn mortigilojn.

Nun demando, ĉu la aranĝantoj de la milito timetis la Kongreson aŭ almenaŭ trovis ĝin malagrabla? Ĉu ili vere suspektis, ke miloj da homoj diverslandaj interkonsentus pri petskribo al ili, kiun ili hontus ne respondi kaj parte pro tio tiel subite aranĝis la militon? Nu, mi nur demandas.

Fine sendante konsolan saluton al la parizaj samideanoj, kiuj en la plej malgranda detalo tiel bone ĉion aranĝis kaj nun vidas ĉion ruinigita, ni ilin korege dankas. Certe ilia laboro tamen ne estis vana, certe ankoraŭ pli profunde la Deko gravurigi en la memoron de tiuj, kies kora intenco estis serĉi la fratan manon por ĝin sincere kaj ĝoje premi kaj, ho ve, estas malhelpata de la bajoneto.

Haltigi la kruelajn antaŭ kiuj ni nun kontraŭvizaĝe staras ni ja ne povas, sed ni devas pli energie ol iam provi, ĉu estas neeble komprenigi al la homoj, ke ili devas esti fratoj kaj ne lupoj aŭ hienoj.

Bengtsfors la dekan de Aŭgusto 1914.

Carl Winberg.



Notoj pri Linné.

II.

Hammarby.

Grandan parton de sia tempo Linné pasigis ĉe sia kampobieno Hammarby en paroĥo Danmark, sude de Uppsala. La tieaj domoj nun apartenas al la ŝtato, kaj estas reordigitaj kiel eble plej kiel en la tempo de Linné. La nunan ĉefdomon konstruigis Linné en 1762. En ĝia supra etaĝo estas konservitaj en sia malnova stato la du ĉambroj, kie Linné mem loĝis; la pli interna el ili estis lia dormoĉambro.

La flankdomo maldekstre de la ĉefdomo estis la antaŭa ĉefdomo. Sur kelkaj el ĝiaj fenestroj estis enbrulitaj pentraĵoj. Estas rakontite, ke reĝo Gustavo 3-a, kiam li estis kronprinco, iuokaze vizitante Linnéon ekhaltis antaŭ unu el tiuj ĉi fenestroj por rigardi la bildojn, kaj ke maljunulino, interne okupata per bakado aŭ simila mastrumagado, supozante ke ŝi estas la objekto de la atento, pro tio komencis river-

enci kaj ree riverenci laŭ sia tuta forto, ĝis la kronprinco ekvidis ŝin, kaj per sincera rido kaj resaluto rekompencis ŝian klopodon.

Ĉirkaŭ la domoj estis ĝardeno, kaj kie nun estas tre ombra parko, tiam estis multo da fruktarboj. Ĉiu el la filinoj tie havis prunuojn, kaj ĝis en la 1820-jaroj restis kelko el tiuj ĉi prunuoj. Proksime de la barilo ankoraŭ estas kvarflanka loko, ĉirkaŭata de nun altaj, dense starantaj arboj. La nepino de Linné nomis tiun ĉi lokon »la bosko de avo». Li multe ŝatis sidi tie fumante sian pipon, kaj tie oni ordigis la tagmanĝan tablon kiam la vetero permesis tion.

Por sia fama herbaro kaj aliaj kolektoj Linné konstruigis apartan dometon sur proksima monteto. Nun ĝi estas ĉirkaŭata de grandaj pinoj, sed tiam la monteto estis tute nuda, kaj la perspektivo do vasta almenaŭ al tri flankoj. Sur la sudokcidenta deklivo Linné aranĝis ĝardenon el siberiaj kreskaĵoj, kies semojn la rusa imperiestrino donacis al li.

III.

La majstro en sia familio.

Estas dirite, ke Linné ne estis tute feliĉa en sia familia vivo. Verŝajne tiu ĉi diro tamen ne estas ĝusta. Linné, kiu ekskluzive okupis sin per siaj sciencaj laboroj, evidente ne amis pensi pri la domaj aferoj. Tiu ĉi cirkonstanco eble ŝajnis al multaj kvazaŭ la edzino estus preninta al si la familian potencon. Sed ne estas kredeble, ke Linné havus siajn gajan humoron kaj optimismon, se li estus malfeliĉa en sia hejmo. Cetere liaj propraj vortoj atestas, ke »Dio donis al li tiun edzinon, kiun li plej deziris, kaj kiu mastrumis dum li laboris».

Tamen oni povas supozi, ke sinjorino Linné ĉe pli ol unu okazo donis al sia edzo ian korekton, kiam li agis kontraŭ ŝia ordamo. Ekzemple okazis iun tagon, kiam gastoj estis invititaj, kaj unu el ili alvenis iom tro frue, ke Linné kaj la gasto ekhavis tiom fervoran interparoladon, ke ili por klarigi la diskutadon — tute forgesante la invitadon — komencis desegni per karbo figurojn sur la kredeble ĵus lavita planko. Tiaj faroj certe povas kolerigi kiun ajn mastrinon.

La rilato inter Linné kaj liaj infanoj estis tre kora. Se tiu ĉi varmeo ne estis ĉiam konstanta koncerne la filon, certe tiu mem

plejmulte kaŭzis tion. Al la filinoj li donis ĉion, kion ili deziris, iam eĉ pli. Okazis, ke irante laŭ ŝtuparo la plej juna filino ekglitis kun portaĵo da porcelano, kies plejmulto kompreneble estiĝis pecetoj. Nu! Plendinte ŝi venis al la patro, kiu nur admonis ŝin, ke ŝi ne malĝoju pro tiu bagatelo, kaj tuj iris por aĉeti novajn objektojn. Oni facile povas imagi, kiom surprizata estis sinjorino Linné ĉe tiu tagmanĝo, kaj kvankam ŝi evidente komprenis »ke Sofio ree malzorgis», ŝi tamen devis kontenti je klarigi, ke Linné mem, opiniinte ke la malnova porcelano estas malbela, disbatis ĝin, kaj aĉetis novan.

El la rondiranta gazeto de la klubo

»Ĉiam pli bone!»



Du fratinoj.

»Ha, se vi sciis kiel feliĉa mi estas, Anna, vi certe envidus min» diris unu tagon la dekokjara Karin al sia fratino, du jarojn pli aĝa. — Mi ricevis fianĉon! Li estas tre bela! »Monon» li havas ankaŭ, ĉar li tiun ĉi vesperon invitis...

»Sidiĝu kaj vin trankviligu iom! Mi unue volas scii lian metion, karakteron, bonajn ecojn k. t. p.; se li sincere vin amas kaj se li estas inda esti reamata.

»Tio estis multe samtempe, kara fratino, sed mi provos respondi la demandojn. Lia nomo estas Erik Wernstedt! Metio vi diris!» »Jes, mi certe ne scias kian metion li havas, sed monon li havas, estu certa je tio! Koncerne la karakteron, mi kredas, ke ĝi estas bona. Mi ne konis lin longan tempon, kaj tial mi ne vidis pruvon je lia karaktero! Sed, ĉu ne estas bona eco ami? Mi scias, ke li amas min; tion mi vidis kaj sentas — kaj ĉu li tiam ne estas inda esti reamata? Certe jes! Li kiu estas tiel bela! Ĝis la somero ni fianĉigos! Ho, kiel feliĉa mi tiam estos!»

Karin, malsaĝa knabino! Vi ne devas rigardi la eksterajn favorojn, ĉar ili malaperigos kun la jaroj. Ne, obeu vi mian konsolon! Elektu alian viron — pli bone unu, kiu ne estas tiel bela — pruvu lin kun jarlonga amikeco, eltrovu lian ka-

rakteron, rimarku se li havas bonajn ecojn, koron kiu varme batas por la noblo, vero kaj justo en la vivo, antaŭ ol vi difinas viun por li. Laborema li ankaŭ devas esti! Se li havus multe da monon, ili baldaŭ malaperos, se li ne laboras. Antaŭ ĉio, rimarku, se li estas sobrolo, absolute sobra! Se vi trovos viron kun bonaj ecojn, kaj li krom tio, vin amas, tiam vi — se vi estas saĝa knabino — pli volonte preferos lin, anstataŭ dando, kiu havas bonan aspekton — sed senestas ĉiujn de la priparolitaj bonaj ecoj. Laŭ mia kredo, tiu Wernstedt estas filo de la pogranda komercisto ĉe la placo. Mi scias, ke li estas al granda malĝojo por sia patro. Li ne laboras, sed forĵetas la tagojn per dormado, legado de romanoj kaj festas dum la noktoj por la mono de sia patro! Kaj tian personon vi povas ami!

Malsaĝaĵojn! Malsaĝaĵojn!

Ĉiam vi ne konsentas al tio, kion mi aprobas! Kion vi kredas, ke tio faras min, ke li festas iafaje, kiam li tamen sin prizorgas? Mi kredas, ke li finos la festadojn, kiam li ricevos min! Kaj krom tio mi lin amas, kiel ajn malbona vi diras ke li estas, mian Erik!»

»Jes, vi certe en la estonteco, faros grandajn kaj funebrajn spertojn, ke li ne estas via Erik!

Dek jaroj pasis.

Anna antaŭ kvin jaroj estas edziniĝinta kun fidebla laboristo, kiu konstruis al si »propran hejmon», kie li pasigas la vivon, en feliĉa estado, kun edzino kaj infanoj.

Ĉe unu el la plej mallarĝaj stratoj de la urbo kuŝas falpreta domo, kies ŝtuparoj kondukas al subtegmenta ĉambro. En tiu ĉambro sidas nun Karin — preskaŭ nereconebla, kun ĉifonaj, malpuraj kaj malsataj infanoj ĉirkaŭ si. La plej granda de la infanoj demandas, en funebra tona: »Panjo, ĉu paĉjo ne baldaŭ hejmvonos kun manĝo? Mi estas tre malsata.»

Jes, ŝi edziĝis kun Erik Wernstedt. Tempon ĉio estis bona, kiam lia patro vivis. Sed la maljunulo mortis kaj lasis post si nur ŝuldojn.

La filo, de kiu li kaj la familio vivus, nenion metion konis?

Li ja povis skribi, sed ĉu li, la filo de la pogranda vendisto skribus por aliaj! Ne, tio estis neebla! Sed de kie preni monon por prizorgado de la familio? »Ho, jes, iom da kredo mi ja havos ĝis mi

ricevos belan laboron,» tiel pensis Erik Wernstedt.

La tempo iris, sed laboron li ne ricevis — sed anstataŭ tio pli kaj pli da kamaradoj, malbonaj kamaradoj! Li komencis ludi kartojn; baldaŭ li estis sklavo sub la pasio de alkoholo, ke li forgesis la suferojn de sia edzino kaj siaj infanoj, en la subtegmenta ĉambro.

Li profundigis tagon post tago kaj fine li ne povis sin levi el la profundajo. La drinkejo estis kaj restis lia plej kara rifuĝejo.

Sed tie hejme en la subtegmenta ĉambro Karin faris tro grandajn kaj malĝojajn spertojn, ke li ne estis ŝia Erik, sed — la drinkeja Erik.

Tradukis
Einar Adamson.



Pli da sunlumo!

Antaŭ kelkaj jaroj S-ro Vilhelmo Willett en Londono faris proponon, kiu jam ricevis varman subtenon en ĉiuj regionoj de la Britaj Insuloj. Unuavide ŝajnas stranga ideo antaŭenpuŝi la horloĝindikilojn je unu horo en la printempo, kaj ilin returnenpuŝi en la aŭtuno. Tamen tia estas la simpla propono, kiu verŝajne post mallonga tempo efektiviĝos.

La hodiaŭaj horoj de laboro ne estas tre oportunaj dum la somero, kaj malpermesas al la komizoj laboristoj profiti la longajn somervesperojn, kiujn sub aliaj kondiĉoj, ili povus uzi por sportoj kaj ekskursoj en la freŝa aero. Forlasinte la laborejon je la sesa horo, estas kutime preskaŭ la sepa antaŭ ol ili estas pretaj por viziti la kamparon. En la grandaj urboj ĉi tio estas ankorau pli malbona, ĉar estas necese veturi longajn distancojn antaŭ ol eniri la kamparon.

Supozu tamen, ke inter la 2—3 nokte je la dua dimanĉo en Aprilo ĉiuj horloĝoj estas antaŭenpuŝitaj, ni ĝuus, estas vere, unu horon malpli da dormado tiun nokton mem, sed dum la tuta somero nia laboro finiĝus efektive je la kvina horo laŭ la suno, kvankam la horloĝoj montras jam la sesan! Sekve ĉiuvespere ni havus la tempon por fari sanigajn promenadojn, sportojn ktp.

Sed iom post iom la tagoj malplilongiĝos ĝis ne plu estos tempo por tiaj ekskursoj kaj tiam, je la dua dimanĉo de Septembro inter la 2—3 horoj nokte la horloĝaj indikiloj haltos dum unu horo, kaj oni revenos al la efektiva sunohoro. Tiun nokton ni ĝuos unu horon pli da dormado, rekompence je la printempa perdo!

Per tia simplega rimedo la vasta armeo da laborantoj povos ricevi 150 horojn plie de vigliga sunlumo dum siaj liberaj horoj. Kompreneble oni povus atingi la saman rezultaton per oficiala ŝanĝo de la horoj de la laborado dum la somero, sed tio postulus la ŝanĝon de ĉiuj parlamentaj decidoj, kie horoj de laboro estas fiksitaj, kaj de ĉiuj fervojaj horaroj ktp. ktp.

Preskaŭ ĉiuj gravaj urbaj korporacioj de Granda Britujo oficiale subtenas la proponon. Parlamenta komisiono jam pristudis la demandon, kaj estis eltrovite, ke la solaj personoj, kiuj plendus pri la nova aranĝo estas tiuj borsistoj, kiuj makleras kun Usono, kaj la vendistoj de gaso kaj elektra lumo, kaj, verŝajne, la enterigistoj. Cetere unu aŭ du vagonaroj, kiuj veturas internacie aŭ laŭ tajdoj estus iomete konfuzataj. Plue, oni raportis, ke la bovinoj ne havus sufiĉan provizon da lakto por la mateno de la dua lundo en Aprilo, sed la fakto, ke la matenmanĝa ovo nepre estos pli freŝa — aŭ ni diru malpli malfreŝa — je unu horo tiumatene havigas kompenson.

Ĉirkaŭ S-ro Willett troviĝas ĉiam pligrandiganta armeo de propagandistoj, kaj jam oni enpenetras aliajn landojn malgraŭ la fakto, ke nia geografia situacio metas nin en la plej profita loko por tia ŝanĝo. Kaj tiu ĉi ekskurso en la internaciecon konvinkis S-ron Willett pri la gravega bezono por internacia lingvo. Ni do vidas kun speciala plezuro lian nomon inter la plej lastaj membroj de la Brita Esperanto Asocio kaj eble la vasta batalantaro por la *Daylight Saving Bill* fariĝos Esperantia Entrepeno. — *H. Bolling-broke Mudie.*



Varje medlem

av Svenska Esperantoförbundet erhåller *La Espero* gratis. Afgiften, 2.— kr, insänder till kassör *J. Helsing Gävle.*

Korespondado.

Anonceto pri korespondado kostas 40 oeroj (2 respondkuponoj).

Hispanujo. — S-ro Satur Zavra, Correo, 7, 3:0, *Bilbao*, deziras korespondadi per poŝtkartoj kaj leteroj kaj intersanĝi poŝtmarkojn



Ungdom! Esperantister!

Anslut eder till »Kamrat-Unionen», som har världsspråksfrågan på sitt program. Program och organisationsform finnes i »Samling», som erhålles om 15 öre i frim. insändes till **Einar Adamson, Gefle.**

Prenumeranter!

Ingå som medlem i Svenska Esperanto-Förbundet. Avgift för enskild medlem är 50 öre pr år och kan detta insändas till S. E. F:s kassör *J. Helsing, Gefle.*

Anmoda Edra bekanta att prenumerera på »La Espero», som endast kostar 1:20 pr år från »La Esperos» expedition, Gefle.

Insänd alltid meddelanden om fäster, propagandamöten, nybildade föreningar o. s. v.

Annonsera om Edra möten i »La Espero».



Gävle Esperantoförening

avhåller ord. månadsmöte tisdagen den 1 september kl. 8 e. m. å lokalen S. Kungsgatan 8.

Alla medlemmar böra närvara.

HERRAR

ekipera sig bäst och fullständigast hos

Axel Lidholm

Drottninggatan 30 - - GEFLE

Kiam vi bezonas
viandon, mendu
ĉe

FRANS A. OLSON

Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

Presenter inköpta hos

Juvelerarefirman

A. U. Wahlberg, Gefle

äro alltid välkomna.

Filial i Bollnäs.

Josef Wikströms

Tobakshandel

GEVALIAPALATSET - GEFLE

Central- och Jernvägshotellen

GEFLE

REKOMMENDERAS!

SKODON

Största sortiment hos

A. M. Zimmerman & Co



C. J. LINDH

BOK- & DISTRIBUTIONSÄFFÄR

S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE

Rekommenderar sig vid behov av
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.

RIKSTELEFON 16 97.

LECIONOJN de
Itala, Latina kaj Portugala Lingvoj
per Esperanto

kaj aliajn interesajn fakojn publikigas la internacia duonmonata revuo "L' ESPERANTO".

Jarabono Fr. 3.25 (Sm. 1.300)

Kolekto 1913 (1:a Jaro) enhavanta 21 lecionojn de Itala lingvo Fr. 2 (Sm. 0.800)

Specimenon kontraŭ respondkupono.

Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista — London.

Sin turni al eldonisto

A. PAOLET - S. Vito al Tagliamento (Italujo)

Abonejoj ĉe ĉiuj Librejoj kaj Esperantaj Gazetoj.

La Espero

utgives av Gefle Esperantoförening och utkommer omkr. den 15 i varje månad.

Lösnummerpris 10 öre.

Prenumerationspris Kr.

1: 20.

Prenumeration kan ske dels direkt hos tidningens expedition, Gefle, dels genom återförsäljare eller på posten.

Återförsäljare önskas på varje plats! Provision om flere exemplar tagas!

Prenumerantsamlare erhålla 20 öre för varje anskaffad prenumerant, om minst 5 prenumerationsavgifter insändas samtidigt.

Abonprezo ekster Svedujo 1:00 Spesmilo. (12 numeroj).

Specimeno kontraŭ respondkupono. Mendo ĉe R. Pehrsson, 3—23, Gefle.

PROVU LA KOPIOKRAJONON

ESPERANTO!

3:— kr. por dekduo. 30 oeroj por unu.

W. WAHLUND, GEFLE

Wickmans Kappaffär

NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE

Vid Rådhusplanaden.

Kappor o. Promenaddräkter i stort urval. Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.

RIKSTELEFON 1391.

Gust. Holms Förstoringsanstalt

Brunnsgatan 78, Gävle. □ Tel. 1628.

Faras pligrandigojn laŭ fotografajoj.
Unuaklasa laboro. Petu prezaron!

N. Lundgren

GEFLE - Interurba tel. 151

Kamentuboj por fabrikoj.

Pli ol 750 konstruitaj.

Riparoj dum uzado.

Fulmkonduktiloj estas muntataj.

Propra briketo en Upsala.

Plej granda firmo por konstruo de fabrikoj kamentuboj en Skandinavio.

Argentata medalo en Stockholm 1897

» » » Gefle 1901

» » » Norrköping 1906



Från

La Esperos expedition, Gävle,

kan rekvireras:

Läroböcker:

Lärobok i Esperanto av G. H. Backman 1:—

Lärobok i Esperanto av P. Nylén 1:—

Lärobok i Esperanto av Carl Ohlsson 0: 50

(Alla med Esp.-svensk ordlista).

Esperanto-språklära av O. W. Hjærtstätt 0: 40

Esp.-svensk och svensk-esp. ordbok av O. W. Hjærtstätt 0: 60

Svensk-esp. ordbok av E. L:son Finn 1: 50

Sveda Kantaro, kun melodioj 0: 35

Esperantista Kantaro, » 0: 75

Nova Testamento (afrankite)... 2: 50

Esperanto-stjärnor 0: 75

Esperantoflagga (bordsflagga)... 2: 40

d:o (nägot enklare) 1: 75

d:o (mindre) 0: 85

d:o d:o 0: 50

d:o (miniatyr) 0: 15

10:e världs-Esperantokongressens officiella vykort. 1 duss.

1:— kr. 1 st. 0: 10

d:o reklammärken, 100 st.

1:— kr. 1 st. 0: 02

Ozarowsky & Pehrssons

Bleck- & Plåtslageri

N. Kopparslagaregatan 15, Gefle

o TELEFON 188 o

Finna Esperantisto

Officiala monata organo de Esperanto-Asocio de Finnlando. Abonprezo 3:— Fmk.

Adreso: **S-ro Albin Sandström,**
11, Köpmansgatan, Helsingfors.